

Kulturaj Kajeroj

É.MAHÉ

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1968 **2**

KULTURAJ KAJEROJ

1968 MARTO-APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Gresillon
Karaj geamikoj.

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Okaze de la 60-a Nacia Kongreso
Arles — F. Garrigues

Rabelais, dibocûlo aŭ klerulo (II) — J.-P. Guillot

Top-Sekreto de la venenoj — R. de la Taille

100-jara jubileo de A.-M. Gorkij
Blanka floro — A. Logvin

Monologo :
La morto de l'kato — M. Špicer

Por via distro
Nia Konkurso — P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

EL GRESILLON

Karaj geamikoj,

Ankaŭ ĉijare la Esperanto-Domo Gresillon kalkulas pri vi. Ĝi atendas vin, konatulojn kaj nekonatulojn. Ne pli feliĉa ĝi estas ol kiam ĝi akceptas sub ĝia tegmento multajn geamikojn, eĉ kiam kelkaj komence mutas, balbutas aŭ « krokodilas ». Ĝi bone scias, pro longa sperto, ke eĉ la timemuloj tre rapide « degelas », tiom varma estas la akceptado. « Izolulo » estas vorto tute nekonata en la Grezijona lingvo. Do venu !

Kion vi faros ? Vi elektos inter laboro kaj ripozo. Ni pretigis por vi kursojn, kiuj ebligos vin eklerni, plulerni aŭ ellerni la lingvon. Vi povos aŭskulti D-rojn Lapenna kaj Zlatnar, S-rojn Thierry, Sekelj, Dobrynski kaj Becker, kaj partopreni en la Libera Tribuno, kies ĝenerala temo estos « Modernaj Formoj de laboro en la nuntempa Esperanto-movado ». Vi povos ankaŭ viziti la regionon, la Loire kastelojn, la belajn urbojn Angers, Le Mans kaj Nantes. Vi povos distriĝi ĉar ne nur laboron ni proponas al vi, sed ankaŭ paroladetojn kun kolorbildoj, filmojn, ludojn, dancojn. Vi povos promeni en la parko, en la ĉirkaŭaĵo, al la dolmeno. Vi povos baniĝi, fiŝkapti. Aŭ, tute simple, kuŝiĝi sur la herbejoj rigardante la ĉielon. Do, venu !

Ĉio estas preta. Vi povas veni. La homoj pretigis lokon kaj programon. La arboj elektis siajn plej allogajn verdkolorajn vestaĵojn. La floroj instaliĝis en la taŭgaj lokoj. La birdorkestro ĉiutage provkantas por prezenti sian plej belan someran koncerton. Ne seniluziigu ilin. Venu diri al la arboj, al la floroj, al la birdoj, ke vi ŝatas ilin. Venu danki ilin. Ĉar nur por vi ili faris sin tiel belaj. Ne nur la homoj senpacience atendas vin. Do, venu !

NIA PROGRAMO

de la 30-a de Junio ĝis la 21-a de Julio :

Kursoj (S-ro Ribot) - Ekskursoj - Ekzamenoj.

de la 22-a de Julio ĝis la 4-a de Aŭgusto :

ĝis la 27-a : SEMINARIO de UEA.

« Modernaj Formoj de laboro en la nuntempa Esp-movado » kun partopreno de D-roj Lapenna kaj Zlatnar, S-roj Becker, Dobrynski, Sekelj kaj Thierry.

ĝis la 4-a : Diverstemaj prelegoj - Ekskursoj.

de la 4-a ĝis la 25-a de Aŭgusto :

Kvar kursoj - Ekzamenoj Fotoarto, bindado, korbofarado - Ekskursoj.

de la 25-a de Aŭgusto ĝis la 8-a de Septembro :

Kursoj - Ekzamenoj - Ekskursoj.

Poste : Ripozo.

Petu informojn : Gresillon, 49 - BAUGE, Francujo.

Esperanto tra la Mondo ★

SOMERAJ MANIFESTACIOJ :

— Feriaj kursoj en Helsingör : kvar diversaj internaciaj kursoj, de la 21a ĝis la 28a de julio en Danlando. Skribu al Sro L. Friis, Ingemannsveg 9, DK 8230, Abyhöj (Danlando). Aŭtune, aliaj kursoj en Aarhus (13-19a de oktobro).

— Somera Universitato en Gyula (Hungario), 6-13a de julio, kun altnivelaj prelegoj kaj distraĵoj. Adreso : Somera Esperanto-Universitato, Petofi ter 3, Gyula, Hungario.

— Internaciaj ferioj en la Roza valo (en Pavel Bania), Bulgario. Du periodoj : 5-15 kaj 20-30a de junio.

— Sub la patronado de Mondpaca esperantista movado : Semajno de Internacia Amikeco, en Plzen, Ceĥoslovakio, 16-23a de junio. Adreso : Zk-Roh Skoda, Kopeckého sady 13, Plzen.

— Semajno de la Balta Maro, en Germana Demokrata Respubliko, en Rostock, 7-14a de julio. Adreso : Esperanto-grupo, Kulturbund, Kröpeliner str. 25, 25-Rostock, DDR.

— Renkontiĝo por esperantistaj naturamikoj, 20-30a de julio, en Abaliget (Hungario). Adreso : R.E.N., Pécs 1, pôstfako 2, Hungario.

— Eŭropa Ferio-Semajno, en Gwatt, ĉe la lago de Thun, Svislando 25-31a de aŭgusto. Adreso : Sro Ernst Glättli, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg (Svislando).

— Internacia Esperanto-Semajno, 18-25a de julio, en Romans, Francio. Adreso : Esperanto-Federacio, 31 strato Pêcherie, F-26 Romans.

— Seminario, sub aŭspicioj de U.E.A., en la esperantista Kulturdomo de Grésillon, 49 - Baugé, Francujo, 22a de julio - 1a de aŭgusto. Kun Prof. Lapenna, Jean Thiery, Tibor Sekelj, Dro Zlatnar, Günther Becker, Hans Bakker.

— Internacia Geografia Semajno, 11-17a de aŭgusto, en Bilbao (Hispanujo). Deko da prelegoj pri la temo : « Geografiaj esploroj en nia epoko » kaj interesaj ekskursoj. Adreso : Grupo Esperantista de Bilbao, Barrencalle-Barrena 7, 1° dcha, Bilbao 5, Hispanujo.

— Instruista konferenco, en Sonnenberg, Germanujo (20-29a de septembro). Adreso : Sro H. Sonnabend, Im Eckerkampsfeld IIa, D-3161 Dollbergen, Germanujo.

EL POLLANDO :

— Laŭ nova decido de la Pola Ministerio de Klerigo kaj Superaj Lernejoj, ĉiuj lernejoj unua — kaj dua — gradaj, kiuj decidas enkonduki la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto, devas sekvi la oficialan instruprogramon preparitan de Pola Esperanto-Asocio kaj jus aprobitan de la Ministerio. La aprobo de la instru-programo estas nova sukceso en la batalo por akceptigi Esperanton, kiel egalrajta kun aliaj instruobjektoj.

EL FINNLANDO.

— Universala Esperanto Asocio elektis, kiel kongresurbon por 1969 Helsinki, Finnlando. Antaŭ — kaj post — kongresaj aranĝoj estas antaŭvidataj en Svedujo kaj Soveta Unio. La Universala Kongreso okazos de la 26a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1969.

POR LA GEJUNULOJ :

— La 6a « Essex International Jamboree » havos esperanton, kiel duan lingvon. Ĝi okazos de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto, en Belchamps, Hawkwell' ĉe Southend. Esperantistaj skoltoj, partoprenu ! Petu informojn de Barrie Clarck, 23, Wordsworth Road, Coventry kaj rilatu kun la sekretario de Skolta Esperanto-Ligo, Sro Hammer J.K., Taxusstraat 7, Zaandam, Nederlando.

— Por esperanto-kursoj en labortendaroj, TEJO bezonas junajn esperantistojn, kiuj tre bone regas la lingvon kaj estas pretaj instrui ĝin. Krome estas bonvenaj junaj helpantoj esperantistaj (labortendaroj en Francio kaj Nederlando). Informoj donas Fino J.-M. Liouville, 6, rue Léon-Vaudoyer, 75-Paris 7e.

— La raporto de « Programo pasporto » indikas, ke jam 50 gejunuloj anoncis sin por esti gasto kaj ke 28 familioj anoncis sian pretecon gastigi ilin. Skribu por informo al R. Feldman, Bv. 866-A Rosario, Argentino.

ELDONAĴOJ :

— Resumoj en Esperanto — apud aliaj lingvoj — enkondukis la anglalingva revuo « Medicamundi ». La revuon dediĉitan al radiologio kaj parencaj fakoj, eldonas la firmo Philips, en Nederlando.

— La eldonejo « Stafeto » publikigis « Okuloj », altnivelan novelaron de nia talenta verkistino Marjorie Boulton.

— « La Mondpercepto de la modernaj natursciencoj ». Tiu libro entenas la prelegojn de la 10a internacia seminario de Germana Esperanta Junularo. Ĝi estas grava kontribuaĵo al la scienca literaturo en esperanto.

— Denove « Kio estas spiritismo » de A. Kardec, kondenso de la doktrino de spiritismo.

— La grandformata disko « Jen nia mondo » (kantoj de la usonanoj Bob Dylan kaj Pete Seeger, kantitaj de « Duo Espera »), estas denove havebla post dua eldono (33 r/m, 30 cm. kun tekstoj).

— Regule aperadas la monata « Heroldo de Internacia Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanta Asocio ». Adreso : P.K. 25, Sofia, Bulgario.

— Ankaŭ la Italaj Ŝtataj Fervojoj uzos de nun la internacian lingvon en sia horaro, aldonante ĝin al la aliaj jam uzitaj lingvoj.

JARO DE HOMAJ RAJTOJ.

— En la kadro de la jaro de Homaj Rajtoj, organizita de Unuiĝintaj Nacioj, U.E.A., kunlaborante en tiu agado, reeldonis la esperantan tekston de la Universala Deklaracio kaj senpage liveras ĝin. Krome, la revuo « Esperanto » publikigis en februaro kaj marto, artikolojn pri la persekutoj kontraŭ la internacia lingvo, en diversaj landoj.

POR LA MEMBROJ DE LA FRANCA PACMOVADO :

— La gazeto « Combat pour la Paix », organo de la franca « Mouvement de la Paix », publikigis tutan paĝon pri esperanto. La francaj esperantistoj, anoj aŭ simpatiantoj de tiu movado povas aliĝi al « Franca Esperantista packomitato », adreso : Sro Jean Dalet, 79 bis, rue du Château, 92 - Asnières, Francio.

Internacie, « Mondpaca Esperantista Movado » publikigas, alternative en diversaj landoj, la gazeton « Paco ». Redaktoro : Sro Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37 - St-Symphorien, Francio.

Okaze de la 60-a Kongreso de U. F. E. en Provenco

ARLES

O ci, kiu estis ĉio, kion oni povas esti,
La Metropolo de Imperio,
La Ĉefurbo de Reĝlando,
Kaj la Madono de Libereco.

Frederiko Mistral.

Tiuj paroloj de la provenca majstra verkisto, Mistral, permesas aserti ke, trairante Arles'on, ni kontaktiĝas kun la tuta historio de tiu regiono.

La unuaj loĝantoj konataj, la Liguroj, starigis apud la urbo, en la praepoko, meze de la tiamaj marĉoj nun malaperintaj, menhiron sur la monteto « Cordes » (Pr. Kord').

La klimato, la pejzaĝo strange memorigas Italujon. Ili allogis la Romianojn. La regiono fariĝis « Provincia Romana », sekve ĝia nomo : Provenco. Arles profitis tiun allogon. Frue granda haveno, tre aktiva dank'al sia situo sur Rodano, proksime de la maro, ĝi kunligis Hispanujon kaj Gallion kun Italujo, pere de la grandaj vojoj Aŭrelia kaj Domitia. Ĝi komercis kun ĉiuj mediteraneaj urboj, vendis la tritikon de Comtat Venaissin (Venecia Grafejo), la oleojn de Provenco, la rodanajn vinojn. En la ŝipfarejoj, oni senhalte laboris. Ĉar ĝi situas apud la enfluejo de Rodano, amasoj da varoj akumuliĝis sur la bordoj de la riverego. Ili venis de ĉiuj mediteraneaj havenoj, el Oriento, Grekujo kaj Afriko. Dokistoj ilin malŝarĝis el la ŝipoj, kaj, tuj, enŝipigis ilin sur aliajn malpli grandajn por transportado ĝis la plej internaj partoj de la lando. Oni parolis ĉiujn lingvojn tiam konatajn. Oni renkontis ĉiaspecajn homojn kun la plej strangaj kostumoj : komercistojn, maristojn, soldatojn venantajn el la plej malproksimaj partoj de la antikva mondo.

La urbo estis eleganta, kun sia amfiteatro, sia teatro, siaj monumentoj el marmoro, siaj belaj statuoj. La loĝantoj kuniĝis sur la vasta Forumo, la koro de la urbo. Sur ĝiaj kahelegoj, blindetigantaj pro la suno, ili promenis, kontraktis aferojn, interŝanĝis novaĵojn. Pluraj temploj, starigitaj je la honoro de la dioj kaj de la imperiestroj, ricevis piaĵojn de la popolo.

Pura akvo alkondukita per multekosta akvodukto atestas la rafinojn de la tiamaj Arles'anoj, kiuj jam ne volis trinki la akvon de Rodano. Aldonu bluan ĉielon, tian sunon vivigantan la kolorojn : vi havas spektaklon prezentitan de neniu alia urbo.

Arles konis sian veran apogeon nur dum la dekadenco de la romia imperio. Imperiestro Konstantino restadis en la urbo. Ĝi lin allogis, memorigis al li Romon pro sia situacio, sia milda klimato, siaj afablaj loĝantoj, posteuloj de la veteranoj venigitaj antaŭ tri jarcentoj de Cezaro,, konservinte siajn kutimojn. La elekto de la Imperiestro pligrandigis la potencon de la urbo, kies prestiĝo ĉiutage kreskis.

La urbo pliriĉiĝis, pligrandiĝis. Oni konstruis novajn monumentojn. Ili ĉirkaŭis la publikajn placojn. Ponto el ŝipoj kunigis la du bordojn de Rodano. Nova kvartalo kreskis sur la dekstra bordo. Luksegaj varmbanejoj eĉ donis sian nomon al kvartalo.

La filo de Konstantino, naskiĝis en Arles, en 314. Tiu, poste restadis en la urbo. La ludoj, la festoj konis neordinaran brilon. La kuroj en la cirko, la teatraj prezentoj estis belegaj. Neniam la urbo konis tian epokon, tiel vivoplenan, tiel gajan. La tuta Imperio ĝin rigardadis. Oni ĝin nomis : « Galla-Rometo ».

La multaj tomboj borderantaj la malnovan Aŭrelian vojon formis la nekropolon « Elizeaj Kampoj ». Tie, tuj de la kvara jarcento, la nobeloj, la riĉuloj, sin entombigis. Iliaj ĉerkoj sekvis malrapide la fluon de Rodano.

Kiam la Romia Imperio ruiniĝis en la anarkio kaj la invadoj, Arles konservis ankoraŭ grandan rolon. Ĝi fariĝis ĉefurbo de sendependa reĝlando. Tiel, Arles dufoje konis la apogeon de

sia gloro, dufoje ĉefurbo. Ĝi iomete konservas la nostalgion de tiu pasintaĵo pere de siaj monumentoj. La antikva profilo de ĝiaj filinoj, la stilo kaj la harmonio de iliaj kufo kaj kostumo memorigas tiun epokon.

Unu el la unuaj, la urbo konis la komunumajn institucioĵn. Ĝi profitis tre imponan kaj larĝan senimpostecon dum epoko, kiam la franca lando konis la teruran feŭdismon. Ĝi eĉ fariĝis respubliko, ĝis 1486, kiam ĝi estis definitive aneksita al franca krono. La franca asimilàdo ne estis tre facila kaj postulis multajn jardekojn. Hodiaŭ, ankoraŭ, la provenca lingvo estas parolata de ĉiu Arles'ano, inda je sia deveno.

La preĝejo « Sankto-Trofimo », konstruita dum la XIa kaj la XIIa jarcentoj, staras en la angulo de la placo. Ĝia kradego prezentas la finan juĝon. En la timpano Kristo prezidas la Sanktan Manĝon. La dek-du apostoloj sidas sub liaj piedoj ; en la maldekstra friso la beatigitoj akceptataj en Paradizo, en la dekstra, vi vidas la malbenitojn. En la apuda klostro, unu el la plej belaj en Francujo, vi rimarkas la diversecon kaj la nombron de la statuoj, kapiteloj, kolonoj.

Forirante el la klostro, turnu dekstren ĝis la antikva teatro, greko-roma. Ĝi povis enteni 12.000 rigardantojn kaj ankoraŭ montras siajn majestajn ruinaĵojn : belegajn ĝemelajn kolonojn el marmoro, kiuj subtenas parton de la kornico kaj stumpojn de du aliaj, antaŭe simetriaj al ili, luksega dekoracio por nunaj mire belaj prezentadoj.

Je kelkaj metroj, oni ekvidas la imponan amason de la Amfiteatro, pli popole nomita Arenoj. Konstruita dum la la kaj la IIa jarcentoj, ĝi povis enteni 25.000 personojn. Ĝi estas nun la plej granda en Francujo. Dek-kvin mil rigardantoj povas sidi sur ĝiaj ŝtupbenkoj. Supreniru ĝiajn saracenajn turojn, vi havos belan perspektivon al Rodano, Kamargo, Alpiĵoj, Kraŭo..

Revenu al placo Respubliko. En la kontraŭa angulo, iru laŭ la strato Respubliko, ĝis la « Muzeo Arlaten » (leg. Arles'ana Muzeo). Per la mono de Nobel Premio, kies laŭreato li estis en 1904, Frederiko Mistral ĝin kreis. Juvela restarigo de la pasinteco interna kaj familia de Provenco, la « Muzeo Arlaten » estas unu el la plej interesaj folkloraj muzeoj en Francujo, kun siaj portretoj, kostumoj el la diversaj epokoj, mebloj, bestoj, nenombreblaj iloj, pentraĵoj de Leo Lelée, la mastro de la arlesaninaj siluetoj.

Por fini la viziton, iru promenante, laŭirante la belegan promenadon « Lices » (pr. Lis'), sub la milda ombro de ĝiaj mikokuloj, ĝis la Nekropolo Alyscamps (« Elizeaj Kampoj »). En la tuta gallo-romia tombejo, vi povos ripozi kaj mediti, apud la tombo de iu riĉa prapatro.

F. GARRIGUES.



Ĉu vi sendis vian reabonon ?

Ĉu vi abonigis amikon ?

Ne plu atendu

Adresoj de perantoj sur la lasta kovrilpaĝo

P. BABIN -- 44 - NANTES

p.k. Nantes 281361

RABELAIS, DIBOĈULO AŬ KLERULO ? (II)

Nur rapida trarigardo de unu el la verkoj de Rabelais, kiel ekzemple « Gargantua », donas ideon pri la verkisto. Tuj aperas, ke li multege ŝatas la vivon, la simplan vivon de la kamparanoj, kaj popolanoj. Tuj aperas ankaŭ, ke tiu amo de la simpleco estas la rezulto de longa studado kaj pensado pri la homoj. Oni vidas rapide, ke li tute ne estas ĝenata kiam temas pri « pli altnivelaj » aferoj ; li tre facile povas paroli pri filozofio, medicino ; li volonte montras kiel regas la bona reĝo, kaj kiel agas la stulta reĝo. Lia kono pri « militarto » aspektas serioza, kiam li montras, ke forto ne ĉion povas, ke ankaŭ ruzo devas esti uzata.

Tiu unua impreso, instigas al pli profunda studo de lia verko, kaj de lia vivo. Ni unue aŭskultu la mediciston :

« La intenco de la fondinto de tiu et-mondo, estas « konservi en ĝi la animon, kiun li metis. La vivo « konsistas el sango, la sango estas la loko de la « animo. Unu nura laboro, tamen, lacigas tiun mon- « don : ĝi daŭre forĝas sangon. En tiu forĝejo, ĉiuj « membroj havas sian propran oficon, kaj ilia or- « ganizado estas tia ke, senĉese unu prunteprenas « de la alia, unu pruntedonas al alia, unu ŝuldas « al alia, la materialo estas konvena metalo por iĝi « sango, ŝanĝita kaj donita de Naturo. Pano, kaj « Vino : en tiuj du estas entenataj ĉiuj specoj de « nutraĵo. Por ilin trovi, pretigi, kuiri, la manoj la- « boras, la piedoj marŝas kaj portas la tutan maŝi- « non, la okuloj ĉion kondukas.

« La apetito, je la enirejo de la stomako, dank'al « iom da « amareta melankolio » eldonita de la « « ratelle » petas la enmetadon de la « viandon », « la lango ĝin provas, la dentoj ĝin maĉas, la sto- « mako ĝin ricevas, kaj fluidigas, la vejnoj « meza- « raiques » elsuĉas tion, kiu estas bona kaj konvena, « forlasante la fekaĵon, kiu, per konvena tubo, estas « eliĵetita, kaj portas ĝin al la hepato, kiu ĝin ŝan- « ĝas en sangon.

« Tiam, laŭ vi, kia estas la ĝojo de tiuj oficistoj, « kiam ili vidis tiun oran rivereton, kiu estas ilia « nura restoracio ? Ne pli granda estas la ĝojo de « la Alĥemiistoj, kiam post longaj laboroj, grandaj « penoj kaj elspezoj, ili vidas la metaloj, kiuj ŝan- « ĝiĝas en iliaj fornoj... ».

Tiu « kurso » pri medicino, fakte, ne finiĝas ĉi-tie. Rabelais tre longe parolas pri la vivo de la homa korpo, kaj, tiamaniere, montras, kiel granda estis lia kono pri ĝi. Tre verŝajne, li estis la unua medicisto, kiu kuraĝis malfermi korpon de mortinta homo por montri al siaj lernantoj ĉiujn organojn, kaj klarigi iliajn oficojn. Tio estis vere kuraĝa en epoko, kiam tio estis absolute malpermesata, ĉefe pro religiaj kaŭzoj. Lia kono do, ne nur estis bazita sur legado de multnombraj libroj, sed li ankaŭ faris eksperimentojn por vidi per si-men. Tio estas tute simple la moderna metodo de scienco.

Sed li opiniis, ke ne nur medikamentoj estis necesaj por kuraci malsanulon. Li ankaŭ uzis sorĉajn vortojn kaj movojn de la manoj. Ĉu ni revenas al la ridinda aspekto de nia aŭtoro ? Plej seriozaj kaj fidindaj personoj asertas, ke Rabelais estis alĥemiisto. Sed oni ne devas opinii tial ke li serĉis kaj faris oron... Fakte por Rabelais kaj ĉiuj seriozaj alĥemiistoj, tiu « Reĝa Arto » estis senĉesa laboro por sukcesigi ŝanĝon de iu metalo en iun alian, sed precipe por si-mem ŝanĝi per filozofa laboro paralela al la konkreta laboro sur la fornoj. En tiu serĉado la menso de la laboranto tiel laboris, kiel la manoj. Nenio povis okazi en la fornoj se la homo, kaj eĉ la ĉirkaŭanta mondo ne reagis kun la bojlanta aŭ la sekiĝanta materialo.

Oni ja povas dubi pri tiu interago, sed oni ne povas forgesi la spiritostaton, kiun donis tiu teorio por kompreni Rabelais. Laŭ li neniu medikamento kapablis agi sen la helpo de la medicisto. Pli ĝenerale li opiniis, ke la mondo estas unu granda tuto, kies la homa korpo estas malpligrandigita bildo, kaj ke en tiuj mondoj nenio povas okazi sen la helpo de la tuto, kaj sen reago sur ĝi.

Tiu teorio, eldirita per mezepokaj vortoj aspektos ridinda, sed se oni pensas pri la kosmaj ra 'ioj, kaj pri la ŝanĝoj sur la surfaco de la suno, kiuj tiom agas sur nia vivo, la teorio iĝas tute moderna kaj serioza. Se, plie, oni aŭskultas niajn modernajn psikologojn, kiuj klarigas multajn korpajn malsanojn, kiel nur mensajn malsanojn, oni tiam vidas, ke Rabelais provis kuraci laŭ tre modernaj metodoj.

Sed la surprizoj ankoraŭ ne estas finitaj, kiam oni plulegas la skribojn de Rabelais :

« Celocus asertis, ke la tero vere moviĝas kaj « turniĝas ĉirkaŭ siaj polusoj, ne la ĉielo, kvankam la « kontraŭo sajnas esti vera. Estante sur la rivero Loi- « re, ŝajnas al ni, ke la proksimaj arboj moviĝas. « Male ili ne moviĝas, sed nin-mem forportas la de- fluo de la boato ».

Por kompreni la gravecon de tiu aserto, oni devas memori, ke Rabelais skribis tion proksimume en 1530, kaj Galileo Galilei devis nei tiun teorion por savi sian vivon en 1633, unu jarcenton poste.

Rabelais estis fakte tre kompetenta astronomo kaj ankaŭ lerta astrologo. Tiu duobla intereso pri la steloj estis tre ofta en tiu epoko, ĉar eĉ la famaj astronomoj Tichobraé kaj Keppler estis oficialaj astrologoj en iliaj landoj. Li eĉ konis multajn manie-



rojn por diveni la futuron, kaj li detale priskribas ilin en la 3e libro de « Pantagruel ». En tiu libro li forte primokas tiujn sorĉaĵojn, kaj oni povas kredi, ke li ĉion imagis. Sed pli verŝajne li uzas tiun manieron ĉi-tie kiel en ĉiuj siaj libroj, ĉar li timas, ke tro serioza klarigado estas por li danĝera.

Oni ja povus paroli senfine pri tiu granda figuro de la franca mezepoko. Oni ne povas diri, ke li estis granda artisto ĉar li estis ankaŭ granda sciencisto. Li estis tre lerta medicisto, sed li, la unua, kuraĝis skribi por la popolo en « vulgara » lingvo, kiu estis la franca lingvo. Tiun lingvon neniu nuntempa franco komprenas, sed al li ni ŝuldas la kreadon de literatura franca lingvo. Fakte la plej simpla metodo por aprezi Rabelais estas legi liajn librojn, en kiuj oni trovos multe por ridi, sed ĉefe por revi kaj pensi. Kaj, ĉar li tiel bone scias reklami por siaj libroj en la Prologo de « Gargantua », ni lasu al li la parolon por fini tiun prezentadon :

« En la Dialogo de Platon, nomita « La Festeno », « Alcibiades, laŭdante sian guverniston Socrates, « diris lin simila al « silenes ». La « silenes » estis « iam skatoletoj similaj al tiuj, kiujn ni vidas nun ĉe « la montrofenestroj de la apotekistoj, pentritaj laŭ « gajaj kaj frivolaj figuroj faritaj por ridigi la publi- « kon. Sed kiam oni malfermis tiujn skatolojn oni « trovis delikataĵojn : balzamon, ambron, moskon, « juvelŝtonojn, kaj aliajn preciozaĵojn.

« Tiel Alcibiades vidis Socrates ; kaj vere se vi « nur kredus la aspekton vi ne nur donus ceperon « por li tiel korpe malbela kaj sintene ridinda li es- « tis. Li havis pintan nazon, frenezan vizaĝon, ktp... « Sed se oni traborus lian eksteran koverton, oni tro- « vus ĉielan kaj senegalan materialon : juĝpovon pli « ol homa, mirindan virtecon, nevenkeblan kuraĝon, « senegalan sobrecon.


« Laŭ vi, kial tiu antaŭprelego ?

« Vi, miaj bonaj disciploj kaj aliaj frenezuloj, « kiam vi legas de miaj libroj nur la gajajn titolojn, « vi facile imagas, ke en ili temas nur pri mokaĵoj, « petolaĵoj, kaj gajaj mensogoj ; vi ne serĉas plie ; « vi fidas la eksteran aspekton. Sed vi ne devas tiel « facile taksi la homajn farojn, ĉar, vi-mem diras, « ke la vesto ne faras la monaĥon. Tial, vi devas « malfermi la libron kaj atente konsideri la konklu- « dojn. Tiam vi ekvidos, ke la entenaĵo havas malsa- « man valoron ol tiu, kiun promesis la skatolo. La « vero estas, ke la entenataj temoj ne estas tiom pe- « tolaj ol la titolo kredigas. Ĉu vi neniam vidis hun- « don ekvidantan medolhavan oston ? Platon diras, « ke hundoj estas la plej filozofaj bestoj en la mondo. « Se vi tion vidis, vi povis konstati, kiel li gardas « ĝin, kiel fervore li tenas ĝin, kiel prudente li ek- « mordas ĝin, kiel amene li rompas ĝin, kiel rapide « li suĉas ĝin. Pro kio li tion faras ? Nur pro iom da medolo. Tiu iometo da medolo ja estas pli bonega ol « multe da aliaj aĵoj, ĉar, kiel diras Galien, la me- « dolo estas la plej perfekta aĵo farita de la naturo.

« Kiel tiu hundo, vi devas saĝe flari, taksi tiujn « belajn librojn de alta kvalito kaj valoro. Poste, per « studado kaj ofta meditado, rompi la oston kaj suĉi « la esencan medolon ».

J.-P. GUILLOT.

TOP-SEKRETO DE LA VENENOJ, PLI MURDAJ OL LA H-BOMBO



Kiam Julio Cezaro ekkomencis la konkeron de Gallujo la centestro bezonis kelkkilograman glavon por ekstermi la kontraŭstarantojn. La apero de Pat-Arkistoj-Kompanioj permesis malpliigi la nocan pezon : tiam la sagoj pezis nur kelkajn dekgramojn. La Morto, dank'al la pulvo, igis sin pli kaj pli malpeza : dekgrama kuglo sufiĉas pos neŭtrigi ĉian kontraŭulon. La atombombo, ja, multe pli bone efikas : sen dubo H-bombo — milkilograma — neniigas 500.000 ulojn, kio estas 2 gramoj por unu persono.

Kompreneble, estas ankoraŭ multe tro ; ni memoru, ke plej bonstata atleto povas esti tuj mortigita de nur unu sola miligramo de « tetrodotoksino », alidire, dank'al honesta eta kilogramo da ĝi 1.000.000 da personoj, (Marsejlo kaj ĝiaj enloĝantoj) povus malaperi de la mapo.

Ne necesas diri, ke ni ne la unuaj pensis pri tio. Tuj de la naskiĝo de la mikrobiologio, ĉie en la mondo, la militistoj ekintencis supersŭti la kontraŭbatalantojn per bakterioj, virusoj, venenoj kaj aliaj toksinoj.

Bedaŭrinde bakteriologia armilo estas nuna realajo ; sed ĝi kunportas multajn maloportunajojn : la plej grava estas la reiro al la sendinto de la mortigaj bakterioj ; hodiaŭ facile estas semi ĉe la malamikoj terurigan epidemion ; Sed multe pli delikate estas protekti siajn proprajn trupojn kontraŭ epidemio, kiu disvastiĝas sen diferencigi « bonulojn » kaj « malbonulojn ».

Koncerne la venenojn estas tute alie. Longtempe por la potenculoj kaj ilia kunvivantaro, cianido kaj fungoj estis banala armilo, kiu ne interesis la militistojn. Des pli, ke necesas, kvankam malfacile efektivigeble, ke la malamiko englutu sufiĉe grandan kvanton da veneno.

Hodiaŭ tio ŝanĝiĝis. La « Sekretaj Oficejoj » pasie interesiĝas pri venenoj. En domoj, ŝajne banalaj, sed reale plen-plenaj je defendiloj kaj gardistoj, kašiĝas laboratorioj, en kiuj tage kaj nokte serĉistoj klopodas por sintezi venenojn la plej fortegajn nuntempe konatajn : saksitoksinon aŭ tetrodotoksinon.

Necesas diri, ke depost la cianido aŭ arseno, la venenoj multe evoluis ; jen iu urbo eĉ tre granda : imagu, ke oni enversŭ en la puran akvon de ĝiaj rezervujoj kelkajn kilogramojn da saksitoksino ; en la daŭro de kelke da tagoj ĉia vivo estus malaperinta. Cetere oni povus autaŭvidi, kiamaniere disdoni la venenon : aŭ nebulo helpe de bomboj, aŭ aertavoloj elŝutitaj el aviadilo ; gravas ne la procedo sed nur la necesa, tiel malgranda, kvanto da toksino, kapabla ekstermi ; temas pri miligramo, pezo de unu polvero.

Facile komprenebla estas la rigora sekreto, kiu, sur tiu kampo, ĉirkaŭas militistajn esplorojn. Sintezi organikan venenon estas kolosa tasko, kiu nepre dependas de teknikaj rimedoj disponeblaj nur de kelka tempo.

Aliparte ege multnombraj estas venenoj kaj toksinoj. Plue ilia agmaniero, ilia komponaĵo kaj ilia tokseco ege diferencas.

Kiam oni parolas pri venena besto, oni tuj elvokas la serpenton. Tamen inter la 800 serpentspecioj, kiuj endanĝerigas la homon, neniu estas tre venena, kompare al kelkaj ranoj, kiuj same kiel fungoj, iĝas mortigaj nur kiam oni ilin manĝas. Tie ĉi estas necese distingi inter venenaj bestoj :

1) tiun, kiuj havas specialan mekanikan aparaton por inokuli la venenon ;

2) la aliajn, kiuj — sen kroĉilo aŭ pikilo — nur « supraĵe » sekrecias la venenon. Al tiu dua kategorio — malmultnombra je individuoj — apartenas kelkaj amfibiuloj, inter, kiuj la ordinara bufo kaj la miriga kolombia rano, kies unu sola ekzemplero permesas al la indiĝenoj venenigi unu kvindekon da sagoj, nepre mortigaj. Kvankam sendanĝera por la homo, la bufo produktas 2 specojn de venenoj t.e. :

1) mukozan venenon, sekreciatan de la haŭto ;
2) grajnecan venenon eligitan el speco de verukoj.

La mukoza veneno, kies kvanto estas ĝenerale tre malgranda, havas, tuj kiam ĝi eniras la sangon de la vertebruloj, paralizajn karakterojn ; kutime ĝi celas forigi la malamikojn de la bufo.

Kontraŭe, la grajneca veneno estas samtempe abunda kaj potenca. Ĉi, laŭaspekte krema kaj acida, entenas 2 toksajn principojn : unu agantan kiel digitalino, kaj la alia celante mallarĝigi la sangajn angiojn.

Per si mem tiu veneno estas sufiĉe fortega. Se oni kunmetus dozojn rikoltitajn sur 10 bufoj oni povus — principe — mortigi homon. Sed tio estus murda ago, ĉar tia, kia ĝi estas, la bufo montriĝas tute sendanĝera por la homo. Apenaŭ ĝi povas inciti la haŭton, eĉ plie la mukozojn ; tio devigas la hundojn lasi ĝin trankvila.

Multe pli kurioza estas la rano de Kolombio, kiun la indiĝenoj nomas « kokoj », sendube pro ĝia krio. Tiu eta rano, kies nigra korpo striita de

flavaj linioj, mezuras apenaŭ 3 centimetrojn, havigis al la Ŝoko-Indianoj la plej ageman sagvenenon.


Doktoroj Daly kaj Witkop entreprenis ekspedicion, speciale malfacilan, pro la denseco de la virga kolombia arbarego kaj la dikeco de la And-murego. Feliĉe la Indianoj alportis grandan helpon al la ĉasistoj. La kokoj-ranoj vivas en la maldensaĵoj de la arbaro, kaj oni povas ilin malkovri nur aŭdante ilian kanton. Sed, ĉar malofte ili kantas, estis necese dungi infanojn, kiuj tiel perfekte imitas la krion de la ranoj, ke nur tiamaniere oni devigas tiujn ĉi respondi. D-ro Daly sukcesis kolekti 2.400 ranojn. Iliaj haŭtoj traktitaj en laboratorioj donis nur apenaŭ unu trionon da miligramo da veneno. Oni memoru, ke por la Indianoj,

— unu sola ranhaŭto sufiĉas por ŝmiri 50 sagojn,

— unu sago kapablas paralizi beston, tiel rezisteman, kiel leopardo. Oni povas kompreni la eksterordinaran potencon de tiu veneno. Plue ĝi restas agema dum multaj jaroj. Ĝi estas neŭro-muskolo-paralizanto, mortiga, sen ia konata kontraŭveneno ; ĝia kemia strukturo estas parte konata kaj oni scias, ke ĝi parenciĝas kun la steroïdaj hormonoj. Duobla estas ĝia ago sur la nerva sistemo : unuflanke la toksino interrompas la transmision de la nerva influko al la muskoloj (same kiel la sianido) kaj duaflanke ĝi okazigas koran fibretigon. Provojn oni okazigis sur blankaj musoj ;la rezultoj estas jenaj : por la musoj, la batrakotoksino estas mortiga po 2,7 pg/Kg. Tio estas : unu gramo da toksino povas mortigi 7.000.000 da 20 gramaj musoj, en la daŭro de 13'5 minutoj post enperitonea injektado !

Ni forlasu la bestojn, kiuj havas nek kroĉilon nek pikilon.

Do, jen la multaj familioj de tiuj venenaj bestoj, kiuj mordas aŭ pikas. Sur la unua ŝtupo estas la moluskoj ; kompreneble nek helikoj, nek limakoj estas venenaj. Sed tute alie estas por kelkaj konkaĵoj : la famaj Pacifik-konusoj, kies ornama multekonota konko estas nigre makulita, estas kelkfoje mortigaj. En tiuj konkoj la dentoj de la « radulo » similas harpunon kaj entenas venenglandon. La indiĝenoj de la tropikaj marbordoj multe timas tiujn konusoj : ne iel ajn ili prenas ilin per la mano. La pikilo facile penetras en la manon kaj tre danĝera estas tiu veneno. Ni ne parolos pri la serpentoj, kies mordo — en Francujo — ne estas mortiga. Sed ĉiu scias, ke tute malsame estas en « varmaj landoj ». Jam en Maroko oni trovas la ruĝajn viperojn, kornvipurojn kaj aliajn minut-serpentojn — ĉiujn tim.ndegajn —. Laŭ kvalita vidpunkto, la serpent-veneno ne estas terurinda : ekzemple tiu de la krotalo estas 30-foje malpli efika ol tiu de la Kolombio-rano.



(El artikolo de R. de la Taille)
Daŭrigota.



APARTE MENCIINDA

estas la fakto, ke ĉijare la Foiro de Barcelono eldonis 5000 ekz. de aĵiŝoj esperantlingvaj.

Ĝi oferas al ĉiuj geesperantistaj vizitantoj rabatojn en Hispanaj fervojoj, hoteloj en Barcelono kaj Madrido, en muzeoj kaj senpagan eniron en la Foiro. Petu la « Legitimilan ĉarton » :

FOIRO DE BARCELONO
Avenida de Maria Christina
Barcelono 4 - Hispanujo

BLANKA FLORO

(Okaze de 100-jara jubileo, 28- 3-1968, de A.-M. Gorkij)

Li eniris neatendite. Altstatura, bone konata laŭ portretoj kaj priskriboj, Gorkij havigis al ĉiuj el ni afablan manpremon.

Poste li sidiĝis apud tablo. Oni montris al li presprovaĵon de l'aperonta moskva revuo « Naŝi dostiĵenija » (Niaj atingoj), kies respondeca redaktoro li estis. Gorkij atente trarigardis nur kelkajn kaj faris nemultajn rimarkojn. Parton de l'presprovaĵoj li decidis kunpreni, dirinte :

— Ilin vi ricevos iom pli poste, mi volas konatiĝi kun tiuj eseoj pli detale.

La rimarkoj de l'redaktoro elvokis diskutadon.

Unu ĵurnalisto demandis :

— Aleksej Maksimoviĉ, estu bonvola klarigi, en kiu sin kaŝas sekreto de senerara trovo de plej ĉefa, plej interesa presmaterialo ?

— Ĉi tio estas malfacila - respondis Gorkij - kaj samtempe simpla. Dum la elekto de temo kaj materialo oni devas tute klare prezenti al si la kreocelon. Ne forgesi pri noveco kaj aktualeco, kaj poste koncentrado de l'atento, por ĉion observi larĝe kaj nepre akrevide.

Peniga tuso rompis la parolon.

Gorkij sin levis, alpremis ĉe la buŝo naztukon kaj deiris al fenestro, larĝe malfermita.

— Jen estas ŝcivole — denove ekparolis li — kion vi, ĉiuj ĉe-estantoj, trovos neordinaran kaj rimarkindan en tiu ĉi korto ?

Ni alpaŝis al la fenestro. Ekde alteco de la dua etaĝo estis vidata negranda kvadrato de ĉiuflanke fermita korto. Ĝia asfalto estis superŝutita per diversaj objektoj, senorde disĵetitaj.

Iu ekrapidis : Permesu al mi ?

Nu, nu — diris Gorkij, — komuniku al ni pri via eltrovo, estas interese.

— Ĉu ne tiuj ebonitaj tubetoj ? Ŝajnas, ke ili estas uzeblaj, tamen trafis en rubejon...

Iu alia rimarkis pajlan ĉapelon en tiel nekonvena loko. Ĉiuj esprimis indignon pri tiu balaaĵ-pejzaĝo.

Mi silentis. Pli juna kaj malsperta, ol aliaj, mi ne supozis partopreni la eksperimenton.

— Kaj vi, — subite Gorkij sin turnis al mi.

Mi estis konfuzita. Certe, ankaŭ mi vidis la eboniton, la ĉapelon kaj ĥaoson en la korto. Sed mian rigardon kaptis io tute alia. Ĉe malhelruĝa brikmuro, inter ŝtonoj, sur asfalto kreskis blanka floro. Ĉi diri pri tio ? Jes ! Kaj mi diris :

— Al mi plaĉas tiu floro.

Ĉiuj tuj alproksimiĝis al la fenestro.

Gorkij ekridetis, karesis per mano siajn lilipharojn kaj ekdiris :

« Ĉiu havas propran guston. Ĉiu siaopinie pravas. Sed mi plezurigas, ke ne sole mi rimarkis ĉi tiun floron, kondamnitan por soleco, inter malserenaj ŝtonoj... »

Starante ĉe la fenestro, Aleksej Maksimoviĉ diris per profunde emociiganta voĉo, ke la kombino de floro kaj ŝtono estas temo granda, bela. Ĉi elvokas bonajn sentojn kaj gravajn pensojn.

Floro sur ŝtono — simbolo de lukto, en kiu la vivo konkeras. Trem-delikata, vivoĝoja kreaĵo batalas kontraŭ frida, senemocia kaj senmova ŝtono.

Floro estas la poezio de l'vivo, kaj mem la vivo, eĉ se ĝi estas plej eta, sed vera, liberama, forta kaj kuraĝa, varmigita de la suno.

Ni sincere dankis al Aleksej Maksimoviĉ kaj adiaŭis al li.

Li foriris. Post tiu ĉi renkontiĝo pasis preskaŭ 34 jarojn. Tamen en mia animo freŝe kaj hele restis rava aspekto de tiu granda homo kaj tiu eta blanka floro.

Moskvo, 1968. Aleksandr LOGVIN.

Monologo

LA MORTO DE L'KATO

Mi ĵus verkis teatraĵon... tragedion. Ĉu vi permesas, ke mi legu ĝin laŭte antaŭ vi ? Mi esperas, ke ĝi interesos vin. Por ke vi bone komprenu ĝian grandan valoron, mi devas doni al vi kelkajn klarigojn : Mi ne ŝatas longajn teatraĵojn. Ili ofte tedas la publikon ; kaj se, poste, oni volas presigi la verkon, oni ne facile trovas eldonanton. Mi do faris la mian tre mallonga : nur tri aktoj.

La antikvaj aŭtoroj, Shakespeare, Gôthe, Corneille, faris siajn tragediojn multe tro longaj. Ili ankaŭ grave eraris, enmetante en ilin multajn personojn. Ĉi tio estas tre ĝena. Se oni ne bone atentas, oni intermiksas la personojn kaj ne plu komprenas la ludaĵon. Mi decidis havi en mia tragedio nur tri personojn. Al mi plaĉas la nombro 3.

Por fari la tutan aferon, kiel eble plej mallonga, ĉiu akto havos nur unu scenon. Ni do havos entute tri scenojn, kiuj daŭros kune ĉirkaŭ tri minutojn.

Kiaj estas la tri personoj ?

